

La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe UT-Dalaso

mardon, la 3-an de julio, 2012 • numero ok

Hodiaŭaj eventoj

★ 8:45 atm – 12:15 ptm:
Kursoj

★ 3 – 3:45 ptm

En la gufujo, Mark

kondukos nin tra
“Ago-Kastelo”, interaga aventuro.

★ 7:30 – ??? ptm:

Adiaŭa festo en la gufujo!



Antaŭ via foriro

Morgaŭ ni devos foriri de niaj apartamentoj antaŭ la 11-a atm.

Bonvolu meti viajn tukojn (3) kaj litajojn (3) en la kovrilon de via kapkuseno kaj portu ilin kun la kapkuseno al la vitra ĉambro kie vi ricevis ilin en la unua etaĝo (#1.002).

Redonu vian ĉambro-ŝlosilon kaj karton al la deĵoranto.

Vi estos libera iri for aŭ resti ĉe la universitato por tagmanĝi. Uzu vian nomŝildon por eniri la manĝejon. Se vi foriros frue kaj neniu deĵoras en la vitra ĉambro, redonu ĉion ĉe la akceptejo.

Vi povas lasi viajn valizojn en la vitran ĉambron kaj rehavi ilin poste.
Se vi havas demandojn, petu helpon de Ellen.

La NASKa Fasko

Redaktejo: Ĉambro 4.418

<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro. Trovu ĝin matene sub via pordo aŭ en la “gufujo” en la 4-a etaĝo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 4.418, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

“Eble iam...”

de Johano BENTLEY

Jen la lasta epizodo de la rakonto pri Savannah, la filino de Johano. Legu la unuan parton en n-ro kvin de la Fasko, “Kio okazas ĉe Savannah?”

Kiel vi memoras, Savannah ŝirkriegadis pro doloro, kaj mi povis fari nenion krom stari stulte, kaj gapi. Nu, kompreneble, mi tuj alproksimiĝis al ŝi, kaj provis konsoli ŝin, sed ŝi estis sovaĝa pro la kapdoloro, kaj rifuzis eĉ lasi min teni ŝin.

“Igu ĝin ĉesi, Paĉjo”, ŝi kriegis kompatinde, ree kaj ree. Turnante al la pordo, mi celis rapidegi al la flegistejo en la koridoro, sed mi estis jam malfrua. La profesia flegisto, kiun mi puŝis flanken antaŭe, estis jam ĉe la litoflanko de Savannah. Liaj mildaj manoj turnis ŝin, kaj kviete, sed rapide, li enmetis drogon en la kateteron, kiu estis en ŝia brako. Tuj, Savannah kvietigis, kaj iom post iom, ŝiaj brakoj malstreĉiĝis, kaj baldaŭ ŝi duondormis, dum ĝemoj anstataŭis la kriegojn.

“Diable! Kio ĵus okazis?” mi demandis al la flegisto, viŝante ŝviton de mia frunto.

“Mi ne scias, sinjoro”, li diris per trema voĉo, “mi neniam antaŭe vidis tion. Mi telefonvokos la kirurgon tuj!”

Li eliris el la ĉambro, ŝovante sin tra la amaso de flegistinoj kiuj ŝtopis la pordokadron. Ŝajnis ke la flegistinoj enamiĝis al Savannah pro ŝiaj dolĉaj manieroj, kaj pro ŝia kutime kvieta akcepto de iliaj traktaĵoj. Mi lernis poste, ke almenaŭ du el ili ĉiunokte sidis ĉe ŝia lito kaj legis al ŝi, se ŝi vekigis.

Mi elpoŝigis mian poŝtelefonon per tremantaj manoj, kaj vokis mian edzinon. Antaŭ ol ŝi alvenis, sufiĉe da tempo pasis ke la kirurgo kiu enmetis la unuan cerbtubon (ni nomu lin “d-ro Smith”) estis jam tie, kiam mia edzino rapidis laŭ la koridoro al la ĉambro de Savannah. Por

ne vekis Savannah, ni iris al la ĉambreto kiu alfrontis la flegistejon.

Ni sidĝis, kaj mia edzino demandis, “Kio okazis?”

D-ro Smith diris, “Ni ne tute komprenas. Ne estas la cerbpremo. La mezurilo indikas, ke ŝia premo estas normala.”

“Do vi tute ne scias, kio okazis”, mi diris. “Kion vi faros?”

“Nu, ŝi estas jam traktita bone”, li diris.

“Tute ne!”, mi diris. “Ŝi estas nur naroktita pro la doloro. Kion vi faros por kuraci ŝin?”

La konversacio degeneris de tiu punkto. Mi kaj mia edzino demandadis, kaj d-ro Smith evitis niajn demandojn kiel sperta politikisto. Finfine mi diris, “Do, eble VI ne povas diveni, kio okazis, sed eble vi povas direkti nin al alia kuracisto, kiu povas diveni la kialon, ĉu ne?”

“Estas nur mi kaj mia kolego en Mobile. Ne ekzistas alia pediatra neŭrologa kirurgo ĉi tie”, li diris.

“Do ni devas iri al alia urbo”, mia edzino diris. “Estas tre granda kaj bona neŭrologa malsanulejo en Birmingham, ĉu ne?”

Estis kvazaŭ ŝi premis butonon. Lia vizaĝo ruĝiĝis, kaj severa mieno aperis tie. “Tute ne eblas!”, li diris. “Estas tro danĝere transporti ŝin. Se vi faros tion, ŝi eble mortos.”

“Sed ŝi mortas nun!” mi kriis. Ni disputis laŭte dum kelkaj minutojn, sed d-ro Smith estis tute senkompata. Li ankaŭ ne povis doni al ni bonan kialon por sia opinio. Mi ne povis kompreni, kial li preferis ke Savannah mortu, ol direkti nin al alia kuracisto. Finfine, mia edzino prenis sian poŝtelefonon kaj alfrontante d-ron Smith, ŝi telefonvokis la malsanulejon en Birmingham. Ŝajnis, ke ŝi sukcesis, ĉar ŝi tre baldaŭ estis konektita al neŭrologa flegistino.

Mia edzino diris, “Mi havas filinon en Mobile, kiu suferas de hidrocefalo. Ŝi nun estas mortanta, kaj mia kuracisto ne scias kial. Mi volas iri al via malsanulejo por ke vi ekzameni ŝin kaj eble helpu al ŝi.”

(daŭrigo en pĝ. 2)

Mi kaj d-ro Smith povis aŭdi la respondon: “Via kuracisto devas direkti vin al ni. Se li ne faras tion, ni ne devas akcepti ŝin”. Kaj mi ĵuras al vi: tiu aĉulo, d-ro Smith, rigardis min... kaj ridetis.

Ho ve! Mi preskaŭ frenezigiĝis. Devas esti, ke io en mia vizaĝo avertis lin, ĉar la memkontentaĉa rideto subite malaperis, lia vizaĝo paliĝis, kaj li klinis sin malantaŭe en sian seĝon. Mi sentis la manon de mia edzino sur mia ŝultro, kaj kiam mi rigardis ŝin, ŝi skuis la kapon iomete. Poste, kiam ŝi estis certa ke mi ne subite atakos d-ron Smith, ŝi kviete promenis al la koridoro, kiu kondukis al la ĉambroj. Tie, ŝi firme plantis siajn piedojn, streĉis sin al sia tuta alto de kvin futoj, fikserigardis d-ron Smith, kaj diris tre laŭte, **“HO DOKTORO. KIO OKAZIS ĈE MIA FILINO? KIO? ĈU VI NE SCIAS?”**

Ĉiuj el la flegistinoj atentis. Kaj unu kapo aperis el ĉambro laŭ la koridoro. Ŝi daŭrigis, **“EBLE NI DEVAS IRI AL ALIA KURACISTO, ĈU NE? KIAL NE?”**

Nun unu, du, tri, kaj pli da kapoj aperis el ĉambroj laŭ la koridoro. Unu el la flegistinoj ridis mallaŭte, kaj aliaj ridetis. Ŝajnis, ke la geflegistoj ne tre estimas d-ron Smith. Ŝvito ekaperis sur lia frunto kaj lipo. **“SED ŜI MORTAS, DOKTORO. KIAL VI NE VOLAS DIREKTI NIN AL ALIA KURACISTO?”** ŝi preskaŭ kriegis. Nun ni havis malgrandan amason da malsanulejaj laboristoj, parencoj de la paciencoj, ktp.

Mi min klinis al d-ro Smith kaj diris mallaŭte, “Se vi ne direktos nin al alia loko, kaj ŝi mortos, mi promesas ke vi havos proceson en la sekva tago. Ni jam havas atestantojn nun, kiuj povas diri ke vi ne direktis nin al alia loko. Tamen se vi direktos nin kaj ŝi mortos laŭvoje, vi povos diri ke vi avertis nin, ĉu ne?”

Li ŝajne pensis momente, kaj sekve li kapjesis. Mia edzino paŝis al li kaj donis sian poŝtelefonon al li. Ŝi ne malkonektis de Birmingham dum sia lerta kaj bonega prezento. D-ro Smith prenis ĝin kaj rezigne diris, “Mi havas pacieron, kiun mi volas direkti al via malsanulejo.”

Post nia venko, mi kaj mia edzino devis kolekti la medicinajn raportojn de Savannah, kaj aranĝi transportadon al Birmingham. Mia edzino diris ke ŝi preferas aranĝi la ambulancan, do mi eliris por kolekti la raportojn. Unue, mi iris al la tomografejo por preni ŝiajn tomografojn. Tie mi renkontis sekretarion kiu diris al mi ke d-ro

Smith ordonis, ke ŝi ne donu al mi la efektivajn tomografojn, nur la skribitan raporton, kaj ŝi montris al mi grandan koverton. “Tie ĉi estas la efektivaj tomografoj”, ŝi diris. Mi pensis ke io misas. Do mi ekpriskribis mian situacion, sed mi nur ĵus ekkomenciĝis kiam ŝi diris, “Mi bone konas Savannah-n, ĉar mia koramiko estas la flegisto kiu traktis ŝin ĉi-nokte, kaj li parolis pri ŝi ĉiunokte kiam li revenis hejme. Li tre ŝatas Savannah-n.”

Ŝi silentis dum kelkaj sekundoj, kaj poste diris, “Mi deziras kafon. Ĉu ankaŭ vi?” Ne atendinte mian respondon, ŝi zorge kaj malrapide metis la koverton sur la skribotablon, fikse rigardis min, stariĝis, kaj malaperis en la koridoron, supozeble por kafo. Mi rapide prenis la koverton, metis ĝin sub mian ĉemizon kaj eliris, sen la skribita raporto.

Suspektante ke io misas, mi ekzamenis la tomografojn de Savannah en ŝia ĉambro.

Jen la kialo por ĉio! La tomografoj kiun oni faris ĝuste post ŝia unua operacio montris ke la cerbotubo efektive neniam estis en ŝia cerbo – ĝi estis en la muskoloj de ŝia kolo. Ĉu la cerbotubo falis de la kraniotruo, aŭ ĉu la kirurgo neniam metis ĝin tute en la ventriklon, mi ne scias, sed jen la sekreto – la sekreto, kiun d-ro Smith ne volis ke ni malkovru, kaj kiun lia kolego ankaŭ scias, sed ne malkaŝis.

Mi kaj mia edzino ne rajtis sidi en la ambulancan, do ni sekvis ĝin al Birmingham. Ĉu vi scias ke la aŭto *Toyota Prius* povas rapidi cent mejlojn hore? Estas vere – mi povas atesti.

Por mallongigi la rakonton, mi resumas tion, kio okazis poste. La neŭrologa kirurgo, d-ro Wellons, tuj konstatis ke Savannah estis mortanta pro infekto en sia cerbo.

(daŭrigo en pĝ. 3)



Jen la mirakla infanino!

(daŭrigo de pĝ. 2)

Tiu estis la kialo por ŝia grandega kapdoloro tiun nokton. Estis lia opinio, ke la infekto preskaŭ certe okazis post kiam la kolego de d-ro Smith enmetis la mezurilotubon en la cerbon de Savannah. Ĉiuj el la tuboj estis forigitaj, kaj d-ro Wellons enmetis unu tubon en la duan ventriklon. Multe da tre fortaj antibiotikoj eniris la kateteron en ŝian brakon dum la venontaj tri semajnoj. Finfine, konstantaj tuboj estis metitaj en la duan kaj la kvaran ventriklojn kaj Savannah tute resaniĝis.

Kiam mi unue alvenis al Birmingham, mi montris la tomografajojn al d-ro Wellons. Li konfirmis mian opinion pri la unua operacio. Li ankaŭ diris al mi ke la truo en la malantaŭo de ŝia kranio estis multe pli granda ol necese por enmeti tubon. La kialo por la falsa resaniĝo kiun Savannah spertis post la unua operacio estis tio, ke la cerbofluo likis el la kranio kaj en la kol-muskolojn. Do ŝia cerbopremo renormaliĝis, sed la liko ne sufiĉis por daŭrigi la normalan cerbopremon. Jen la kialo por la vizito al la urĝejo kaj la dua operacio. Tio ankaŭ klarigis ŝian konstantan kapdoloron kaj kolodoloron post la unua operacio.

D-ro Wellons devis ripari la kranion kaj muskolojn de Savannah, kiam li forigis la tubojn. D-ro Smith kaj lia kolego tute fuŝis Savannah-n. Eble tion mi povis pardoni. Neniu estas perfekta, kaj kuracistoj ne estas dioj (malgraŭ siaj propraj opinioj). Sed estis nekredible ke d-ro Smith kaj lia kolego ne sciis, kio okazis. Kial ili preferis lasi Savannah-n morti ol direkti nin al alia kuracisto? Mi lasu tion al viaj propraj imagoj.

Sed nun, Savannah eniros la kvaran klason post la somero. Ŝi ne povas skribi per skribilo, sed ŝi povas tajpi. Ŝi povas promeni, kuri, danci, kaj eĉ skii – ĉiuj sen cerebelo.

Ho, mi preskaŭ forgesis. Post ĉio, kiam ni estis denove hejme, mi ricevis leteron de la flegisto kiu helpis Savannah-n. Li diris ke li trovis mian gitaron, kiun mi faligis dum tiu terura nokto, kaj pri kiu mi tute forgesis, kaj li konservis ĝin por mi. Mi reprenis ĝin, kaj eble iam mi denove ludos ĝin. Sed almenaŭ ĝis nun, tiu tago ne alvenis.

Biografia enigmo

de Derek ROFF

Kie mi faris la unuan vojaĝon? Kien mi iris? Malsupren. Longe malsupren. Mi klarigos tiun enigmon per starigo de alia.

Mi naskiĝis en Usono, kiun civitanoj nomas “La Unuiĝintaj Ŝtatoj”. Sed mi ne naskiĝis en ajna ŝtato. Kiel tio eblas? Eble vi divenos. Mia unua sendependa vojaĝo estis per sledo. Mi havas memorojn pri tio, eble parte falsajn.

En la malantaŭa ĝardeno de nia domo, ekzistis perfekta deklivo por infana glitado sur sledo. Tiu deklivo estis parto de la ĝenerala geografia deklivo, kiu kondukis

de la veraj montoj al la maro. En mia infana menso, la ĝardeno monteto estis granda. Mi glitis de la supra ĝis la malsupro, per la sledo, ridante kaj kriante, sekura inter la kruroj de la patro aŭ la patrino. Poste, mi regrimpis ĝis la supra por refari. Aŭ la patro trenis min supren sur la sledo, elekto multe pli amuza.

Sed dum unu tago, okazis grandega paŝo al matureco. Mi rajtis gliti sole per la sledo! Mi memstare gvidis la sledon laŭ la longa deklivo. Kaj transvivis! Kia ekscitiĝo! Kia memfido kaj fiero! Kia ĝojo!

Tio okazis dum la 50-aj jaroj. Ĉio ĉi okazis ie en Usono, ie kun neĝo, kiu ne estis parto de ajna ŝtato. Do, ĉu vi jam solvis la enigmon?

Invito al Ft. Worth

Filipo kaj Elizabeto Dorcas invitas vin ĉiujn viziti ilian gastigaman domon en bela Fort Worth, kiu troviĝas je unuhora distanco okcidente de Dalaso. Jen la adreso:

900 Country Club Lane
Fort Worth, Texas 76112
Telefono: (817) 446-4431

La loko estas sufiĉe proksima al la viv-plena urbocentro por facile ĝui multajn aferojn.

Estas multaj belaj vidindaĵoj por viziti en Fort Worth, aŭ, laŭ via prefero, vi povas simple resti en la gastĉambro aŭ balkono kaj legi.

Nepre voku antaŭe, kaj bonvenon!

Kelkaj ŝercoj... kaj aliaj diversaĵoj

de Ray:

- Teknika difino: **Vindoza**: Medicina kvanto da vino.
- Langtordaĵo: Koreo kaj kurdo kuris kuirejen kaj kune kuiris kareaĵon.

de Tejloro:

- Skeleto eniris tavernon kaj diris, “Mi deziras bieron kaj ŝvabrilon...”
- Okazis Esperanto-kongreso. Poste, junulino reiris hejmen kun sia patro aŭte. Post longa silento, ŝi diris, “Paĉjo, mi devas konfesi ke mi ne plu estas virgulinon.”

Li ekkriis: “Mi elspezis tiom da mono por sendi vin al la Kongreso kaj vi ankoraŭ ne uzas ĝuste la akuzativon!”

Anonco por makintoŝemuloj

Se vi uzas Makintoŝan komputilon, Derek havas senpagan, virtualan Esperanto-klavaron por vi. Per ĝi, vi povos tajpi niajn karajn ĉapelitajn literojn multe pli facile kaj rapide. Kontakto lin persone, aŭ rete ĉe <derek@unm.edu>.